



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44000 NANTES, Francujo

JARABONO :

P. BABIN

Jarabono : 60 fkoj

13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes

P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

1985 - 4

(OKTOBRO - NOVEMBRO - DECEMBRO)

EN TIU NUMERO

vi povos legi pri...



... Leonardo da Vinci

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
Evoluo? (G. Lagrange)	3-4
Leonardo da Vinci (H. Röllinger)	5-7
Paĝo de la geknaboj (Oliviero)	8
Niaj poetoj - G. Berveling	9
Marko d'Oro (Stefano Nagy)	10-11
Por via Distro (C. Cavalié)	12
La vie de Grésillon	13-14
Gramatiko per bonhumoro (S. Guillot)	15

* La redaktantaro de Kulturaj *
* Kajeroj deziras sanon kaj sukceson *
* al siaj legantoj por 1986. Ili *
* esperas, ke ĉiuj legantoj restos *
* fidelaj kaj eĉ helpos pligrandigi *
* la "rondon". La abon-prezo ne estis *
* altigita sed, espereble, la nombro *
* da amikoj, kiuj komprenas niajn *
* malfacilaĵojn kaj kutime "rondigas *
* la sumon", grandiĝos. Antaŭdankon! *
* *****

El Grésillon

Okaze de la oktobra kunveno la konsilantaro fiksas la programon de la aranĝoj por 1986. La datojn de la diversaj periodoj vi povos legi apude. Sed ni konsilas al vi rapide peti la detalan programon por frue aliĝi.

Nia propono pri aranĝo, por grupoj, de turismaj restadoj en Grésillon de aprilo ĝis la 15-a de junio ricevis favoran eĉon. Ni povas sendi al vi liston de eblaj ekskursoj. Ankaŭ pri tio frue rezervu viajn datojn.

KULTURAJ ARANĜOJ 1986

Aprilo 29/3 - 2/4-

Pedagogia seminario organizita de Union Française pour l'Esperanto.

30/3 - 5/4-

Internacia Renkonto de Infanoj.

Junio 15 /6 - 29/6-

Internacia Renkonto kun nedeviga programo: kursoj, eskursoj, distraĵoj.

Julio- Aŭgusto: 29/6 - 20/7-

Prelegoj kaj Kursoj .

21/7 - 10/8-

Kursoj diversnivelaĵ por internacia lernantaro.

10/8 - 23/8-

Informatiko kaj Esperanto-kursoj.

17/8 - 31/8-

Renkonto de blindaj kaj ne-blindaj esperantistoj organizita de F.U.B.E. Kursoj, konversacioj.

ESPERANTO-DOMO

kastelo Grésillon, F-49150 Baugé

Esperanto tra la Mondo



KIEN VI IROS en 1986 (sekvo)-

S.A.T.-Kongreso, 2/9-a de aŭgusto, en Sant Cugat del Valles (Barcelona);

Internacia Kongreso de la Fervojistoj, en Skopje (Jug.), 17/23a de majo.

Konstanta serio de renkontiĝoj, kursoj, k.t.p., en Kultura Centro Esperantista. Adreso: Pf 771, Postiers 27, CH-2301 La Chaux de Fonds, Svisio.

Markola Esperanto-Kongreso en Folkestone, 18/20a de majo. Informas: Frances Randall, 5 Wiltie Gardens, Folkestone, CT19 5AX Britio.

Internacia Esperanto-Semajno, en la naturamika domo de Bodman (Germanio), apud la Konstanca Lago, 9/16a de Aŭgusto. Informas: TANEF, pf 225, CH-4003 Basel (Svisio).

Studsemajnoj pri teatro, ĵurnalismo pedagogio, muziko, en Bouresse (Vienne), Francio. Informas: Societo Y. Martinot, 15/B rue Morel Payen, F-10000 Troyes.

ESPERANTO, KOMERCO kaj EKONOMIO-

Fondiĝis dum la kongreso en Aŭgsburgo Internacia Komerca kaj Ekonomia Fak-grupo (IKEF). La nova fako perados por komercaj rilatoj kaj kunordigos aperigon de artikoloj pri la ekonomia situacio. Informoj ĉe la sidejo: Mondkomerca Eldonejo Esperantista - IKEF, P.O. kesto 25041, NL-3001 HA Rotterdam-Nederlando Por Francio rilati kun S-ro François-Xavier Gilbert, Vert Coteau, Longeville en Barrois, 55000 Bar le Duc.

"Ekonomia Bulteno pri Usono", ĉiumonate ekspedata aerpoŝte, prezentas seriozajn informojn, analizojn, klarigadojn pri la usona ekonomio. Adreso: "Interfakto" P.O.B. 42205, Washington, DC 20015 Usono.

EL ĈINIO-

Aperis la unua bulteno (ilustrita), por la universala kongreso en Pekino, kun salutvortoj de la urbestro de Pekino.

Estas rimarkinde, ke S-ro Lu Ĝaŝĵi, prezidanto de la ĉina akademio de sciencoj, venis mem por paroli

favore pri esperanto en la celebra kunveno de la unua datreveno de la fondiĝo de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio. Li donis diplomon al 131 kursanoj. En ĉiu numero de "El Popola Ĉinio", oni povas legi pri la fondiĝo de pluraj novaj esperanto-organizaĵoj en diversaj regionoj de la lando.

ESPERANTO en GRANDA JAPANA FILMO-

Oni lasttempe projekciis en tuta Japanio, kaj baldaŭ prezentos eksterlande animacifilmon titolitan:

"Nokto de la galaksia fervojo", eltirita el famega rakonto de Miyazawa Kenzi. En tiu filmo, ĉiuj skriboj kaj eĉ kantado de himno estas en esperanto. Ekzistas ankaŭ vidbendo, disko kaj sonbendo de la muziko. Eĉ la kovrilo de la disko kaj de la sonbendo estas esperante skribitaj.

KIBERNETIKO kaj ESPERANTO-

Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko (TAKIS), okazigis sian unuan kongreson "Interkibernetik'85", en Budapeŝto. En tiu kongreso la tri oficialaj lingvoj estis: la franca, la angla, la esperanta. Triono de la prelegantoj uzis la internacian lingvon.

PUPTEATRA INTERNACIA FESTIVALO-

La 18a "PIF" okazis en Jugoslavio, kiel kutime kun granda sukceso. Okazis 127 prezentoj el 12 landoj. Naŭ trupoj el ok landoj ludis 40 prezentojn en esperanto.

REĜA APOGO al la JUBILEA JARO-

La hispana reĝo Juan Carlos akceptis la inviton eniri en la Internacian Patronan Komitaton de UEA por la Jubilea Jaro kaj prezidi la honoran komitaton por Hispanio.

KELKAJ NOVAJ ELDONAĴOJ-

"Germana Antologio ekde la frua epoko ĝis 1700". 327 p. kun enkondukoj.

"Biblia Vortaro". Monumenta verkaĵo de pli ol 400 paĝoj.

EVOLUO ?

Estas konate, ke la vivo evoluis tra la jarmilionoj. La sciencajn kaj filozofiajn skolojn, kiuj provas tiun fenomenon klarigi, oni nomas "evoluismo".

Ankaŭ la lingvoj evoluis. Ankaŭ la teĥnologio evoluas. Kaj estas kurioze, ke, se bone pripensite, ekzistas komunaj trajtoj inter tiuj inter si ŝajne tute fremdaj aspektoj de la "evoluo". La unua komuna trajto estas, ke la tuta estas malverŝajna. kiu rilato povas esti inter la latina "castellum" kaj la franca "château"? Kiel kato aŭ albatroso povis evolui el prasaŭro, kiu pli malpli similas al lacerto? Kiel la TGV(*) pri kiu fieras la Francoj, povus iel esti ido de la karboĉaroj, kiujn oni ŝovis en la britaj minejoj de la XVIIIa jarcento?

Tamen la evoluo okazadas plu antaŭ niaj okuloj, sed tiel malrapide, ke tion ni ne rimarkas. Ĝi iras laŭ etaj diferencetoj. Kaj ĝuste pro tiuj nerimarkataj diferencetoj la disevoluo komenciĝis ĉiam pli frue ol oni supozis unue. La disiĝo inter la klasika latina lingvo kaj la popola, kiu naskis la romanidajn lingvojn jam ekokazis en la klasika periodo, same kiel nun okazas disiĝo inter la skriba kaj la parola francaj lingvoj. Ekzistas hundoj kun interfin-graj membranoj. Ĉu ili iam iĝos fokoj? Ekzistas sciuroj, kiuj ŝvebas de branĉo al branĉo. Ĉu ili iam iĝos vespertoj?

El tiuj nevideblaj "ĝermoj" naskiĝas la evoluo. Nenio supozigis, ke hindeŭropa dialekto parolata apud la Tibero iam estos la rilat-lingvo de tuta Eŭropo dum pli ol mil jaroj, ke tiu simio, kiu devis elturniĝi en seka senarba regiono, iam iĝos la homo, ke tiu globkrajono, kiu tiel fuŝfunkciis en 1948 iĝos tiel ordinara, tiel banala objekto. Kaj, parenteze, Esperanto estis ankaŭ nur ĝermo, nur lingvoprojekto en eta broŝuro proponata...

Notinde estas ankaŭ, ke la evoluo iras ien ajn kaj ke nur pro la cirkonstancoj kaj la selektado ĝi ŝajne iras al iu direkto. La afrikaj simioj perdis sian voston, sed la amerikaj ĝin evoluigis al kvina prenilo.

La prahomoj perdis la prenkapablon ĉe la piedoj sed ĝi jam devis kuri en savano. Ĝi ankaŭ perdis siajn harojn. Sed estis varme, do ne tro gravis. Birdo estas, principe, flugulo. Sed ĝi foje perdis sian flugkapablon, ĉar tro peza (struto), ĉar estis tro da vento (kivio) aŭ ĉar ĝi adaptiĝis al naĝado (sfenikso). Tial ankaŭ plej multaj evoluvojoj estas sakstratoj plej multaj specioj malaperis, plej multaj dialektoj mortas, plej multaj teĥnikaj inventoj fiaskas.

Unu el la kaŭzoj de la evoluo estas la izoliteco. La specioj diversiĝas ĉar ili estis disigitaj. La disdialektiĝo de la latina okazis pro la disfalo de la politika unueco romia. Unu el la aspektoj de la evoluo estas do la "plifajningo" la disdivido de la antaŭo; "simpatio" kaj "kompato" estas etimologie egalaj sed la evoluo disigis tiujn du konceptojn. Lignolaboristo disiĝis al "ĉarpen-tisto", "ĉaristo", "lignaĵisto", "ebonisto", "skulptisto", "tornisto", "modelisto"... Niaj pulmoj estas adaptaĵo de naĝveziko, kiu mem estas adaptaĵo de la stomako de fiŝo, kiu estas evoluaĵo de digestopoŝo de iamaj prafiŝoj, se ne paroli pri la silkaj haroj de bela blondulino, kiuj iam estis la skvamoj de kotvadema fiŝo... Kompreneble mankas la interŝtupoj de la evoluo. Tion Darwin nomis "the missing link" (la mankanta ĉenero). Li parolis pri mankanta ĉenero inter simio kaj homo, kio jam estis skandalo en lia tempo. Sed abundas la "mankantaj ĉeneroj" ne nur inter simio kaj homo sed ankaŭ inter saŭro kaj mamulo, inter saŭro kaj birdo, inter la latina kaj la romanidaj lingvoj.

Nu, oni scias, ke la evoluo okazis relative rapide, kiam temas pri ĉefaj fazoj, ke tio okazis en izolitaj lokoj kaj ĉe malgrandaj bestoj. Kiel trovi spurojn? Ankaŭ la lingvoj evoluis en tempoj senskribaj. La teĥnika evoluo estas pli freŝdata. Estas pli facile spuri ĝin. Sed tiuj interformoj, kiam oni hazarde retrovas ilin, aŭ kiam oni konjektas ilin se temas pri lingvoj, aspektas ridindaj kiel praaŭtomobiloj. Ankaŭ simio certagrade aspektas, kiel karikaturo de la postveninta homo kaj ni parenteze rajtas demandi nin, ĉu ni, homoj, ne estas nur karikaturo de alia pli evoluinta speco de superhomo, kiu venos post ni?

Unu iom terura aspekto de la

evoluo estas la "venko de unu sola". El la vepreca evoluo nur kelkaj transvivis, neniam per kunfandiĝo, ĉiam per venko de unu super la aliaj. Nur per eliminado transvivis la lingvoj, la teknikoj kaj la specioj. Abundas la ekzemploj pri tio. Tial la tezo de Stalin, kontraŭ esperanto, laŭ kiu la lingvoj iam kunfandiĝos estas absurda. Kunfandiĝo ne eblas. Oni devas elekti. Ke mankas ĉeneroj inter la simio kaj la homo, tio estas ĉar "oni" eliminis la kuzetojn kaj certe ne per retorikaj argumentoj. La "batalo por la vivo" de Darwin ne estas nur bela moto.

La franca lingvo estas nur unu el la multaj dialektoj, kiuj fontis el la latina. La tekniko, kiun ni ĝuas estas nur postvivanto el amaso da fiaskintoj. Tamen, kurioze, similaj trudoj foje kondukas al similaj solvoj. La naturo plurfoje inventis la naĝadon kaj ĉiufoje la vivanto estas fiŝforma. Ĝi ankaŭ plurfoje inventis la flugadon kaj trovis similan solvon. Ankaŭ en la lingvoj samaj fonemoj ekzistas en pluraj lingvoj sed ili venas de malsamaj sonoj. La angla kaj la ĉina lingvoj certagrade similas, kvankam ili evidente tute ne parencas. Foje ankaŭ okazas, ke formoj mortas "en glorkulmino": la gotika stilo, la velŝipoj, la vaporlokomotivo... La gigantaj insektoj de la primaro, la gigantaj saŭroj de la sekundaro, la mamuto... Kaj kio pri la homo?

Grava konsekvenco de la evoluo estas la interdependeco. Primitiva formo dependas nur de la medio. Evoluinta formo estas solidara de la propra strukturo. Muŝino, fiŝino demetas ovojn kaj ne plu zorgas pri ili. Abeloj dependas de sia socio. Birdoj kovas kaj nutras siajn idojn. Mamuloj eĉ pli. La homo devas eduki siajn idojn dum multaj jaroj. Ŝtona tranĉilo supozigas nur ŝtonon kaj lerton de la metiisto. Tranĉilo el neoksid-ebla ŝtalo postulas tutan ŝtalindustriion. Primitiva lingvo, tiu de bebo, konsistas el hazarda kunmetaĵo de konceptoj. Matura lingvo dependas de tuta gramatiko kaj preciza vort-trezoro. Kaj tiuflanke ni konstatas konstantan iron al abstraktiĝo: piktografio, ideografio, silabaro, alfabeto,...

Pli konata flanko de la evoluo estas la akceliĝo: necesis dumiliardoj

da jaroj por atingi la plej primitivan videblan vivo-formon, nur 600 milionoj pasis depost la unuaj fiŝoj, la saŭroj datumas de antaŭ 250 milionoj, la unuaj mamuloj de antaŭ 200 milionoj, la primatoj de nur 60, la disforko al prahomo antaŭ eble 5 milionoj, la neandertala de apenaŭ 100 mil jaroj kaj nia rekta praulo de nur 40 000. Estas same en la tekniko; pro akumulado de la scioj. Estus same pri la lingvoj sed bonŝance estas ankaŭ bremsoj por tion malhelpi!

Kurioze estas, ke foje restas trovebla postsigno de la pasinteco: kiam malvarmas ni havas "anserhaŭton"; tio estas malnova reflekso de harbesto, kvankam niaj haroj tute ne plu ŝirmas nin kontraŭ malvarmo. La vorto "tri" estas preskaŭ la sama en ĉiuj hindeŭropaj lingvoj. Same la vorto "bab" (pordo) en la semidaj (**). Nia TVG havas la spuron...de la anglaj diliĝencoj de 1810...

Ĉu eltiri moralon el ĉio tio? La evoluismo estas teorio. La evoluo estas fakto nekontestebla. Laŭ nia kulturo, eduko kaj temperamento ni povos tiujn faktojn uzi por pravigi, ĉu la usonan ĝangalon, ĉu la hitlerajn lagerojn, ĉu la gulagon de sovetio. Homa moralo estas io alia. Ni memoru nur, ke ne iu venko estis ĝis nun definitiva. La homo hodiaŭ regas la mondon. Sed aliaj specioj antaŭe regis! Kaj ili preskaŭ subite malaperis. Kaj koncerne nian lingvon? Ĝi hodiaŭ estas nerimarkita lingveto parolata de manpleno da revuloj, dum fakte regas la dolareca uson-angla. Sed antaŭ sesdek milionoj da jaroj regis la dinosaŭroj, dum neniu eksterterano estus rimarkinta la etajn mamulojn, kiuj tamen jam ekzistis. Kaj transvivis la mamuloj, ĉar ili estis pli inteligentaj, dum malaperis la gigantaj, potencaj prasaŭroj...

G. Lagrange

(laŭ prelego en la Esperanto-Domo Gresillon)

* TGV:(Train à Grande Vitesse) rapidega trajno. Ĝi fakte veturas normale je 250km/hore sur speciala fervojo.

***"Bab-ilono" en la Biblia tempo. "Bab-el-Ued": kvartalo de Alĝero.



LEONARDO DA VINCI

Pri ĉi tiu temo i.a. prelegis s-ano Hugo Röllinger, Bad Kissingen (FRG), okaze de la "Kultura Periodo", la 9-an de Julio 1985 en Kastelo Gresillon. La prelego estis la plej taŭga "uverturo" por aŭtobusa ekskurso en la valon de Loire al la kasteloj Amboise kaj Clos-Lucé. La prelego estis interese akompanata pere de ĉ. 80 diapozitivoj; kvankam ja teksto neniel povas peri la veran impreson de la prelego mem, la sekvontan ni ĉerpis el la manuskripto, havigita al ni de la aŭtoro.

Antaŭ 500 jaroj en Italio vivis artisto, kies reputacio kiel universala geniulo estas vaste konata. Tamen, en matura aĝo de 64 jaroj tedis lin la vivo en la intrigemaj dukaj italaj kortoj tiom, ke li volis elmigri. Lia nomo: Leonardo da Vinci. Reĝo Francisko 1-a de Francujo lin invitis al la bordoj de Loire. Leonardo venis kaj unue teknike plibonigis la akvoprovizadon kaj la internan arkitekturon en kelkaj kasteloj. Krome, interalie, li drenis la marĉojn de Sologne. Kaj li aranĝis multajn pompajn festojn en la kastelo de Amboise. Kion faris la reĝo? Li donacis al sia valora, eminenta gasto kastelon: Clos-Lucé, situantan tuj apud la reĝa kastelo de Amboise. La du najbaroj intime amikiĝis. Por ebligi inter si oftajn senĝenajn reciprokajn vizitojn, ili eĉ konstruigis subteran tunelon inter la du konstruaĵoj.

Kiu kaj kio do estis esence Leonardo da Vinci? Por lin karakterizi servu pentraĵo de Rafaelo, samtempulo de Leonardo. Pompa renesanca fresko, videbla en Vatikano, nomiĝas: "Lumigo de l'homa spirito". Precize en la centro de l'bildo la filozofo Plato estas konversacianta kun sia disĉiplo

Aristotelo. Ilin ambaŭ ĉirkaŭas pensuloj kaj eruditoj. Maldekstre antaŭe, starante, en olivkolora kuto, kunpergamento en la mano, Sokrato, en ekcita disputo. Sur la ŝtuparo, duonnude, kuŝante, Diogeno. Dekstre tuj antaŭe, Eŭklido, klarigante geometriajn principojn. Nu - kiuj interrilitoj ekzistas inter tiu imaga sceno el la Antikvo kaj Leonardo en la Renesanco? En la epoko de l'Helenismo, en la Antikvo, eminentaj filozofoj kaj pensuloj strebe klopodis "trovi la veron", pense klopodis malkovri la esencajn profundajn sekretojn "inter Ĉielo kaj Tero". Tiel same, en la unike prospera epoko de l'Renesanco, Leonardo, per senlaca energio, per genia intelekto kaj prosperiga fantazio, atente observis kaj esploris la plej variajn aspektojn de ĉio, kio estas.

Leonardo naskiĝis en 1452 kiel filo de advokato en la toskana urbeto Vinci, pro tio la pli posta nomo itala: "Leonardo da Vinci". Jam en la aĝo de 16 jaroj Leonard fariĝis lernanto ĉe la fame konata pentristo kaj skulptisto Verrocchio en Florenco. Lernanto-kolegoj estis i.a. la pli poste famaj Boticelli kaj Peruĝino. En la Mezepoko, ja eĉ dum 1000 jaroj antaŭ la Renesanco, la Homo sin mem nur konsideris, kiel kondamnindan, pekan teran vermon, kiu zorgu dumvive prefere por bona rango en la transeja mondo. Kontraste al tiu koncepto, la Renesanco levis la Homon, kiel mezurunuon universalan, en la plej altan pozicion interne de l'krea verko. En tiu epoko kreskis Leonardo, en epoko do, kiu koncedis sufiĉan personan kaj spiritan liberecon. Poste, Leonardo dum sia vivo ofte ŝanĝis siajn mastrojn, inter ili la Duko Cesare Borgia kaj Ludoviko XII-a de Francujo. Sekve de tio, same variaj estis la lokoj de lia aktiveco: Venecio, Florenco, milano, romo, Piombino, Imola, Pisa k.m.a. urboj. Sed eĉ multe pli variaj estas la funkcioj, pri kiuj okupiĝis la geniulo Leonardo. Ĉi sekve tute koncize, en ekzemploj, ni pritraktu liajn verkojn.

Kiel konate, la reĝino inter ĉiuj sciencoj estas la matematiko. La pasia interesiĝo de Leonardo pri geometrio, matematiko kaj proporcioj

akompanis lin dum lia tuta vivo. Ĉirkaŭ 100 paĝojn dediĉis Leonardo al la "Elementoj" de Eŭklido. Por ilustrati tiun klasikan verkon Leonardo verkis el propra fantazio grandiozajn tridimensiajn, stereometriajn desegnojn por la "elementoj", laŭ la koncepto de la greka naturfilozofio: tero, akvo, fajro, aero. Inter tiuj desegnaĵoj dodekadro, aŭ en Esperanto, dekduedro simbolas la universon, la kosmon. En tiaj figuroj Leonardo vidis la abstraktan perfektecon. Tiu pasio fariĝis pliriĉiĝo por la pentra arto de Leonardo kaj fariĝis instigo por liaj teknikaj okupiĝoj. Por Leonardo proporcioj ne nur troviĝas en mezuroj kaj nombroj, sed ankaŭ en sonoj, en pezo, en tempo, en stato, kaj en ĉiu ajn forto. Leonardo konkludis el tiaj kvazaŭaj "ludaj studoj", ke la tuta universo baziĝas sur similaj matematikaj leĝoj, interne de kiuj la naturo kreas senfinan abundecon de formoj. I.a. Leonardo kopiis matematikan tabelon de Paccioli, en kiu li kunigis kaj signis parton de ĉiuj ciferoj, kiuj formas grupon. Laŭ Leonardo neniu homa esploro povas esti nomata vera scienco, antaŭ ol ĝi estas pruvita pere de la matematiko. Aliflanke ĝuste en matematiko la konoj de Leonardo estis modestaj. Simple adiciante li eraras: ekz. anstataŭ 100 li skribis 10. Nu - eĉ geniulo estas nur homo erarema. Cetere Leonardo ne estis nura silentema studulo, tute male: li estis elokventa oratoro en tiu lingvo, kiun estis kreinta Dante Alighieri per sia Dia Komedio, la itala. En tiu lingvo li skribis milojn da notoj aldone al siaj desegnaĵoj; en la itala, ne en la lingvo latina, kiu en tiu epoko estis la universala inter la kleruloj. Sed pri la latina Leonardo okupiĝis estante jam 40-jara. Cetere ĉiujn notojn Leonardo skribis en spegulskribo per la maldekstra mano, supoze ĉar en junaĝo li lezis al si la dekstran. Aliflanke Leonardo alte aprezis la muzikon kaj en ludado de liuto li eĉ instruis. La muziko por Leonardo havis la plej altan rangon inter la artoj post la pentra arto. Muziko por Leonardo estis la "prezentado de l'nevidebla".

Sennombraj estas la provoj de homoj konstrui aparaton aŭ maŝinon kiu, unufoje por ĉiam ekmovigita, kvazaŭ eterne kontinue moviĝadas, do t.n.


"Perpetuum mobile". Supraĵe ankaŭ Leonardo okupiĝis pri tiu problemo, sed tre baldaŭ li ekkonis, ke ties realigo restas utopio pro naturaj leĝoj. Li desegnis ideon baziĝantan sur la fizika levuma leĝo, kiu instruas, ke longa levuma brako efektivas pli da forto ol mallonga brako. Sed neniam el nenio povas kreski energio. Do ni transiru al realismaj projektoj.

La prospera epoko de l'Renesanco apenaŭ favore influis la ekonomian nivelon de la homoj, kiuj manlabore gajnis sian "ĉiutagan panon". La nobelaro eĉ malestimis permanan laboron kaj la homojn, kiuj ĝin faris. Eĉ la artistoj ignoris la laborantan popolon kaj pentris prefere anĝelojn, madonojn kaj dukojn. Alie Leonardo: li esploris la kondiĉojn pri korpa laboro kaj elpensis maŝinojn, por multobligi la limigitajn fizikajn fortojn de l'homo. La muskolan forton de l'kamparano, de ĉevalo kaj bovo anstataŭis la inventema fantazio de Leonardo per la fortoj de vento kaj akvo. Laŭ principo de turbino laboras la t.n. Arĥimeda ŝraŭbo, inventita en la 3-a jarcento a.K. fare de la fama helena matematikisto kaj fizikisto Arĥimedo. Tiun t.n. "ŝraŭbon sen fino" utiligis Leonardo. Rado turniĝas pere de fonta akvofluo kaj turnas du ŝraŭbojn, kiuj tiel en sia interno levas akvon kontinue en du turojn. Do estiĝas akva premo sufiĉa por akvoprovizo eĉ por urbo.

Ekzistas aliaj projektoj ankaŭ rilatantaj al akvo. Ekzemple, dum sia restado en Florenco, Leonardo havis la aŭdacan planon ĉirkaŭkonduki la riveron Arno por krei navigeblan trafikvojon inter la impona urbo kaj la maro. Por konstrui la necesan kanalon, Leonardo projektis diversajn dragilojn kaj elkavatorojn. Koncerna desegnaĵo parolas mem. La elkavigita ŝlimo kontinue estas renversebla en ŝarĝboaton. Tutan aron da projektoj pri boatoj kun mekanika moviĝo ni konas de Leonardo, i.a. skizon pri boato kun padelrajdoj.

Por ni jam ŝajnas tute nature disponi pri eksplodmotoro aŭ elektra motoro. Antaŭ 500 jaroj nur estis imageblaj fortoj de l'muskoloj, de l'vento aŭ de l'akvo. Tamen estis ekstreme grave se boato sin povis formoviĝi sendepende de l'vento. Modelo montras,

ke pere de projektita dentrada trans-
misiilo la padelrado moviĝas eĉ
pli rapide ol la kranko. Cetere
en tia boato la veturanto eĉ povas
vidi, kien li veturas. Kaj sen dispono
pri iu "motoro" tiu solvo do estis
la plej ideala laŭ la naturaj eblecoj
de l'mekaniko. Tre frue Leonardo
ankaŭ ekkonis, kiun forton evoluigas
varmega aero kaj inventis roststangon,
kiu aŭtomate rotacias. La mekanismo
estas simpla kaj praktike aplikebla:
la trablova forto de l'varmega aero
turnas en la kameno simplan helicon,
kies ŝafto turnas siavice, pere
de simpla transmisio, la stangon
kun la rostaĵo - turnas eĉ pli aŭ
malpli rapide laŭ la intenseco de
la flamo! Tio cetere estas la unua
konata utiligo de helico.



Projekto de padelrada boato

Eble la plej mirigaj desegnaĵoj
el la postlasaĵoj de Leonardo estas
tiu pri biciklo. Ĉi-rilata primitive
aspektanta skizo estas, laŭ la cirkons-
tancoj de ĝia malkovro, kvazaŭ sekreto.
Ĉar nur hazarde, antaŭ nur kelkaj
jaroj, oni ekvidis ĝin, post paso
de ĉirkaŭ kvin jarcentoj, sur la
dorsa flanko de simpla folieto.
Evidente la skizon faris lernanto
de Leonardo. Tamen ĝi anticipas
la ideon pri balancado sur nur du
radoj. Eĉ la artika ĉeno kiel trans-
misiilo jam estis elpensita fakto;
sed pasis jarcentoj, dum kiuj ĉio
restis forgesita kaj denove biciklo
estas inventita.

Horloĝoj- akvo, de unu vazo gutanta
en alian, jam mezuris la tempon
ĉe la romianoj, grekoj kaj ĉinoj.
En la Renesanco, do en la epoko
de Leonardo, jam estis uzataj grandaj
sunhorloĝoj. Ĉu do mirige, ke Leonardo

dum sia tuta vivo speciale interesiĝis
pri horloĝoj kaj aliaj aparatoj
por la mezurado de l'tempo? Unue
li konstruis akvohorloĝon. Kaj tuta
aro da skizoj pri mekanikaj horloĝoj
troviĝas en liaj notlibroj, i.a.
en ĉiuj detaloj projektita pezila
horloĝo eĉ kun sonmekanismo.

Globolagro- De iam memoreblaj
epokoj, post la invento de la rado,
la homoj provis meti rulajn elementojn
inter akso kaj lagro, por redukti
la frotadon. Jam antaŭ dumil jaroj
la grekoj, la persoj kaj la romianoj
uzis tuboformajn elementojn en siaj
lignaj veturiloj. Evidente ankaŭ
ĝuste Leonardo, kiel multsperta teknik-
isto, sentis la necesecon de elegante
kaj mole turniĝantaj aksoj en ĉiuj
siaj maŝinoj kaj aparatoj. Kaj li
trovis eĉ diversajn solvojn. Sen
tiaj globlagroj, nove inventitaj
fine de l'18-a jarcento, produktataj
en plej diversaj specoj en milionoj
kaj milionoj da ekzempleroj, nia
moderna industria epoko tute ne estas
imagebla.

Leonardo kiel arkitekto- Kiam Leonardo
naskiĝis en 1452, ĝuste tiam estis
finita la fame konata kupolo de l'Santa
Fiore en Florenco. Ĝia arkitekto
estis Filippo Brunelleschi, samtempe
oraĵisto kaj skulptisto. La elipsa
formo ebligis, ke la giganta kupolo,
kun diametro de 42 metroj, povis
esti konstruita kaj masonita tute
libere, sen apoga trabaro. Tio signifis
revolucion en la tiama konstruado.
Pro tio kaj ĉar Brunelleschi ne nur
estis sperta arkitekto, sed ankaŭ
fame konata artisto-inĝeniero, teknik-
isto, oraĵisto kaj skulptisto, liaj
verkoj forte influis Leonardon dum
lia vivo. Dum jaroj post la morto
de Brunelleschi, la nefinita centra
kupolo de l'katedralo de Milano forte
ekcitigis la magistratanojn. Ne ĉesis
pasiaj disputoj inter la respondeculoj
pro la maldigna aspekto. Pro tio
Leonardo partoprenis en konkurso
pere de projekto, kies koncepto konstru-
teknike grave perfektigas tiun de
Brunelleschi.

Hugo Röllinger

(La fino de tiu artikolo
aperos en la venonta numero.)



LEONARDO DA VINCI

Pri ĉi tiu temo i.a. prelegis s-ano Hugo Röllinger, Bad Kissingen (FRG), okaze de la "Kultura Periodo", la 9-an de Julio 1985 en Kastelo Gresillon. La prelego estis la plej taŭga "uverturo" por aŭtobusa ekskurso en la valon de Loire al la kasteloj Amboise kaj Clos-Lucé. La prelego estis interese akompanata pere de ĉ. 80 diapozitivoj; kvankam ja teksto neniel povas peri la veran impreson de la prelego mem, la sekvontan ni ĉerpis el la manuskripto, havigita al ni de la aŭtoro.

Antaŭ 500 jaroj en Italio vivis artisto, kies reputacio kiel universala geniulo estas vaste konata. Tamen, en matura aĝo de 64 jaroj tedis lin la vivo en la intrigemaj dukaj italaj kortoj tiom, ke li volis elmigri. Lia nomo: Leonardo da Vinci. Reĝo Francisko 1-a de Francujo lin invitis al la bordoj de Loire. Leonardo venis kaj unue teknike plibonigis la akvoprovizadon kaj la internan arkitekturon en kelkaj kasteloj. Krome, interalie, li drenis la marĉojn de Sologne. Kaj li aranĝis multajn pompajn festojn en la kastelo de Amboise. Kion faris la reĝo? Li donacis al sia valora, eminenta gasto kastelon: Clos-Lucé, situantan tuj apud la reĝa kastelo de Amboise. La du najbaroj intime amikiĝis. Por ebligi inter si oftajn senĝenajn reciprokajn vizitojn, ili eĉ konstruigis subteran tunelon inter la du konstruaĵoj.

Kiu kaj kio do estis esence Leonardo da Vinci?? Por lin karakterizi servu pentraĵo de Rafaelo, samtempulo de Leonardo. Pompa renesanca fresko, videbla en Vatikano, nomiĝas: "Lumigo de l'homa spirito". Precize en la centro de l'bildo la filozofo Plato estas konversacianta kun sia disĉiplo

Aristotelo. Ilin ambaŭ ĉirkaŭas pensuloj kaj eruditoj. Maldekstre antaŭe, starante, en olivkolora kuto, kunpergameno en la mano, Sokrato, en ekcita disputo. Sur la ŝtuparo, duonnude, kuŝante, Diogeno. Dekstre tuj antaŭe, Eŭklido, klarigante geometriajn principojn. Nu - kiuj interrilitoj ekzistas inter tiu imaga sceno el la Antikvo kaj Leonardo en la Renesanco? En la epoko de l'Helenismo, en la Antikvo, eminentaj filozofoj kaj pensuloj strebe klopodis "trovi la veron", pense klopodis malkovri la esencajn profundajn sekretojn "inter Ĉielo kaj Tero". Tiel same, en la unike prospera epoko de l'Renesanco, Leonardo, per senlaca energio, per genia intelekto kaj prosperiga fantazio, atente observis kaj esploris la plej variajn aspektojn de ĉio, kio estas.

Leonardo naskiĝis en 1452 kiel filo de advokato en la toskana urbeto Vinci, pro tio la pli posta nomo itala: "Leonardo da Vinci". Jam en la aĝo de 16 jaroj Leonard fariĝis lernanto ĉe la fame konata pentristo kaj skulptisto Verrocchio en Florenco. Lernanto-kolegoj estis i.a. la pli poste famaj Boticelli kaj Peruĝino. En la Mezepoko, ja eĉ dum 1000 jaroj antaŭ la Renesanco, la Homo sin mem nur konsideris, kiel kondamnindan, pekan teran vermon, kiu zorgu dumvive prefere por bona rango en la transeja mondo. Kontraste al tiu koncepto, la Renesanco levis la Homon, kiel mezurunuon universalan, en la plej altan pozicion interne de l'krea verko. En tiu epoko kreskis Leonardo, en epoko do, kiu koncedis sufiĉan personan kaj spiritan liberecon. Poste, Leonardo dum sia vivo ofte ŝanĝis siajn mastrojn, inter ili la Duko Cesare Borgia kaj Ludoviko XII-a de Francujo. Sekve de tio, same variaj estis la lokoj de lia aktiveco: Venecio, Florenco, milano, romo, Piombino, Imola, Pisa k.m.a. urboj. Sed eĉ multe pli variaj estas la funkcioj, pri kiuj okupiĝis la geniulo Leonardo. Ĉi sekve tute koncize, en ekzemploj, ni pritraktu liajn verkojn.

Kiel konate, la reĝino inter ĉiuj sciencoj estas la matematiko. La pasia interesiĝo de Leonardo pri geometrio, matematiko kaj proporcioj

niaj poetoj

VIVO STUDENTA

Ĉi ĉambro luita sen ajna etoso,
nur aĵoj el antaŭ jardek' - aliulaj
nenio la propra - nenio de mi...
Sidadi dorskurbe pri filologio
legante studente kaj ĉu komprenante?
Senstova eĉ vintre ĉi ĉambro senbrua
sengasta kaj fraŭla sen ia allog';
luita la ĉambro - ĉi mia palac'...

En Peruĝa salono diapozitivojn
rigarde aŭskulti atente al Banti,
mingape ridaĉi pri Pfiffig, Devoto;
ekestas kompreno pri prao Etruska:
kaj klaŭn' Pallottin' en hotelo krepuska
lekcia kun eta "ĉaĉa" studentinojn
kaj vespere

danci mi emas
tvisti kaj salti
prance dance kun belulin'
turniĝade turniĝi
nek halti
salte kaj salte,
ho kiom da knaboj
ni ŝovis de l'plank'
kaj solaj plu ni
nur vi kaj mi solaj
ĉiuj ĉirkaŭe nin spektis
solaj plu ni -
danci ni volis
tvisti kaj salti
ho kiom knabinojn
ni puŝis de l'ej' kaj dumtage
En Peruĝa salono impona kaj sombra
aŭskulti lecionojn pri l'prao Etruska
aŭskulti pri Ajsar kaj Klanar, pri...

ho danci mi emas
tvisti kaj salti
nur solaj plu ni
Kaj hejme, retroveninte en olda ĉi Leiden:
la ĉambro luita sen propra etoso
nenio la propra - nenio de mi...
kaj reve, sopire
ho
solaj plu ni.

Gerrit Berveling - 3-11-84

notoj: Leiden, malnova universitata urbo en Nederlando,
precipe fama pro la filologiaj fakultatoj.
En la "Università per Stranieri" de Perugia (Italia)
-la Someruniversitato por Eksterlandanoj- ĉiujare
okazas kursoj i.a. pri Italaj lingva kaj kultura, pri
Etruskologio, pri Arthistoria, k.t.p. La kurso pri
la Etruskaj aferoj (lingva, historia, arto, arkeologio)
estras Prof. Massimo Pallottino; en 1969 akompanis lin ĉe
la lekciaj i.a. Prof-ino Banti kaj Prof-oj Pfiffig kaj Devoto.

marko d'oro

legas du novelojn

Jam ni scias, ke Marko D'Oro "fama, entuziasma esperantisto", fariĝis KATO - Komencanta Amatora Talento Originala - gajninte en literatura konkurso; sed tio ne kontentigis lin, ĉar li volis esti B.T. - BoTo. Kio estas tio? La revuo "Liberatura Bazar" ĉiujare aranĝas literaturan konkurson kaj tiuj, kiuj ne gajnas premion, fariĝas B.T., t.e. "Bazara Talento". Jen, pri ĉi tiu titolo revis, songis M. D'Oro, kiu presigis sur la vizitkarton: Marko D'Oro KATO kaj BoTo.

La unuan paŝon li faris direkte al la literaturaj montosuproj, eĉ li havis sian propran literaturan ideologion, nome:

La angla literatura mondo,
Jen mia literatura fonto!
Verki originale en Esperanto?
Devas mi nur esti simpla tradukanto!

Guste pri tio li cerbumadis, el kiuj anglalingvaj revuo, gazeto, ĵurnalo aperintaj ie en la mondo li "originaligu" rakonton, novelon, kiam la najbarino, la maljuna onjo Humalia kriis al li en la ĝardeno, tra la barilo: "Maĉjo, mia animeto, vi ŝatas legi librojn, gazetojn; eĉ vi scias ian sekretan lingvon Separento..." - Esperanto, kaj ĝi ne estas sekreta", interrompis ŝin Marko. "Egale", daŭrigis onjo Humalia. "Mi trovis interesan novelon en la revuo "Kuraĝa Virino". Jam la titolo estas interesa: "La venĝo de l'arbotrunko". Vi devos ĝin legi" - "Mi dankas al vi vian komplezon", kaj li iris al la barilo transpreni la revuon. Vespere li legis ĝin. La novelo plaĉis al li.

Sekvatage li ricevis plurajn Esperanto-revuojn, inter ili la revuon "Humora Vivo". Ĝi estis la lasta, decembra numero de la pasinta jaro - estas nun junio, brilas la suno - en kiu la ĉefredaktoro deziras feliĉan novan jaron kaj - ne gravas el la vidpunkto de nia rakonto - kompreneble sur la kovrilpaĝo vidiĝis neĝkovritaj montoj kaj arbaro. Kaj jen la miraklo!

Originala Esperanta novelo verkita de Brumy G'Umo: "La arbotrunkoj ne forgesas". Jen la rakonto en "Kuraĝa Virino". Granda arbotrunko, kiun oni ne elfosis el la tero kaj sur kiu estis konstruita deketaĝa hotelo, post kelkaj jaroj tiom ŝvelis, ke iun nokton ĝi levas la hotelon kune kun ĉiuj loĝantoj, restoracio, kafejo. Oni tuj pensas pri teruristoj, sed pafadon neniu aŭdis, neniu telefonis anonime, en la urbaj rubujoj neniu trovis sciigon, eĉ baldaŭ evidentiĝis, post funda esploro, ke rompiĝis akvotubo apud la arbotrunko kiu iom post iom pleniĝis de akvo, ege ŝvelis kaj kaŭzis la tragedion kaj la morton de 1217 personoj kaj ĉio ĉi en la granda turisma sezono. La polico konstatis, ke esperantistoj ne troviĝas inter la viktimoj ĉar la gesamideanoj dormas ĉe siaj korespondantoj kaj korespondantinoj. Esperantistoj nur dum la granda Kongreso loĝas en hotelo. Saĝa esperantist(in)o scias, kie okazos la kongresoj en la sekvaj jaroj kaj tie serĉas korespondamikojn, aŭ amikinojn.


Jen la rakonto en "Humora Vivo". En ĉi tiu novelo rolas tri arbotrunkoj kaj la tuta nova stacidomo leviĝas alten iunokte je la dekdua, ĝuste kiam alvenas la ekspresa trajno "Kureganta Testudo". Jen la fantazio de la esperantista novelisto! Guste tiuj relparoj leviĝas en la aeron, sur kiuj bruege haltas la "Kureganta Testudo" plena de pasaĝeroj. Kaj jen la miraklo! Okazas nenio malbona; nur ili ne povas elvagiĝi, ĉar la vagonoj troviĝas en dekmetra alteco. Jen, denove alia bonŝanco! Sur la apuda relparo, kiu leviĝas nur je kvin metroj, staras ŝarĝvagonoj kun bovinoj; do la infanoj povis ricevi ĉiutage freŝan lakton. Cetere estis severe malpermesite vendi lakton en la stacidomo, nur alkohol-aĵojn. La plej granda problemo estis... hum... la uzado de tiu ejeto, sur kies pordo estis skribite: "Dum la restado de la trajno en la stacidomo ĝia uzado estas rigore malpermesita. Oni ricevos punpagon laŭ la paragrafo 00397/WC/1876 SF - Ŝtataj Fervojoj". Kaj la regulo estis observata tage-nokte fare de la konduktoroj kaj kontrolistoj restantaj en la trajno. La SF neniam esperis tiom da punpagoj,

kiom tiusemajne. Komence ili eĉ kvitancon donis pri la sumo de la punpago, poste nur por kvin personoj unu kvitancon, sed ankaŭ tiel tiuj tre rapide elĉerpiĝis. Fine ili notis la nomojn kaj adresojn kaj promesis perpoŝte sendi la kvitancojn, ĉar "regulo estas regulo". La uzantoj volonte pagis anticipe, ĉar tiam ili ricevis la kopiaĵon, kiu en tiaj mizeraj cirkonstancoj estis tre utila. Post unu semajno pretiĝis la ŝtupetaro kaj la tragedio bonŝance finiĝis. Nur la staciestro mortis, ĉar la staciestro troviĝis ĝuste - ŝatata vorto de la novelisto - super unu el la arbotrunkoj kaj li kune kun la seĝo defalis, kiam la arbotrunko levis lin ĝis la plafono. La sekvan tagon li estus estinta pensiumita. Jen, la vojoj de la sorto estas nekalkuleblaj. Bonŝance li estis "olda fraŭlo". Ĉe la entombigo evidentiĝis, ke sep infanoj funebras lin. La infanoj konatiĝis unu kun la aliaj ĉe la ĉerko de sia patro. "Estis kortuŝe vidi la georfojn", skribis la loka gazeto "Kuraĝa Vivo".

Marko D'Oro tage-nokte rompis al si la kapon, kiel eblas, ke la du noveloj tiel okulfrape similas unu la alian. - Li estis inteligenta homo, li ja lernis Esperanton - Fine ĉio iĝis klara al li. "Ankaŭ mi estos BT, kiel Brumu G'Umo", li diris al si kaj li laboris tage-nokte. Kaj vere pretiĝis lia "originala novelo". Kie li trovis la ideon, nu, tio restas sekreto. Li elektis krim-temon. Jen ĝia titolo: "La junaj jaroj de la mortinte naskiĝinta bopatrino". Subtitolo: "Ne forŝtelu tion, kio estas la via". Registrite li sendis ĝin al la redakcio de Libera-tura Bazarro. La sorto, en la persono de onjo Humalia favoris lin. La dua vojo por fariĝi fama, konata, vera literaturisto de nia kara lingvo!

Stefano Nagy

LA AVENTUROJ DE FIFI STULTUL



POR VIA DISTRO

SOLVO de la ANTAŬA ENIGMO

La trovota "letereto de komencanto" estis: Estimata samideano, mi deziras korespondi kun vi. Ĉu vi respondos al mi? Kore via.

NOVA ENIGMO

A	Kunligis per komuna ĵuro	16	154	67	97	27	146	145
B	Tirane premegi (neol.).....	113	153	52	99	7	177	
C	Tre proksima estinteco	110	11	172	73	120	29	
Ĉ	Ne tute distingebla por la spirito	151	162	44	62	19	155	178
D	Botelo kun longa kolo	91	129	24	96	117	59	
E	Sciigi okazaĵon kun ĝiaj cirkonstancoj	126	6	38	132	161	75	174
F	Elektra lampo	115	23	49	166	176	35	
G	Dum malgranda daŭro	105	76	25	164	85	64	150
Ĝ	Centon' de franko	4	123	89	14	78	122	
H	Arangis iamaniere kompostaĵojn	56	124	40	140	20	101	66
Ĥ	Dirmanier' propra al iuj lingvoj	158	149	80	34	103	3	171
I	Ĝi eligas malmulte da lumo	12	127	112	168	90	55	45
J	Muldita vianda ĵeleo kun kortobirdo aŭ fiŝo	65	160	81	53	18	70	48
Ĵ	Ofte farita pro moko aŭ doloro	94	170	63	10	143	83	104
K	Specoj deambio por amortizi ŝuldon	119	43	131	95	22	159	107
L	Parto de la Brita Insulo	130	2	26	36	68	114	106
M	Ne tute konforma al plej severa moraleco ...	116	169	30	175	86	139	50
N	Kiel ĝi ekzistas de la naskiĝo	88	32	141	82	128	142	157
O	Libera de mikroboj	47	167	152	163	173	21	
P	Metita de la flegisto sur vundon (s.f.).....	8	92	1	148	69	74	57
R	Instigi al la plenumo de devo	41	134	147	54	133	31	
S	Konsiderante nur la nomon	79	109	121	60	84	135	39
Ŝ	Superregi, superi (en la P.V. ne en la P.I.V.)	108	15	58	136	72	13	
T	Temerareco	93	138	33	46	9	100	118
U	Fruktoj	37	102	5	165	125	71	
U	Nenia kvanto	42	87	179	17	77	156	
V	Rilataj al misteraj fenomenoj	111	98	61	137	51	28	144

1P	2L	3H	4G	5U	6E	7B	8P	9T	10J	11C	12I	13S	14G	15B	16A	17U	18J	19C	20H	21O	22K		
23F	24D	25G	26L	27A	28V	29C	30M	31R	32N	33T	34H	35F	36L	37U	38E	39S	40H	41R	42U	43K	44C	45J	
	46T	47O	48J	49F	50M	51V	52B	53J	54R	55I	56H	57P	58B	59D	60S	61V	62C	63J	64G	65J	66H	67A	68L
69P	70J	71U	72S	73C	74P	75E	76G	77U	78C	79S	80V	81J	82N	83J	84S	85G	86M	87U	88N	89C	90I		
	91D	92P	93T	94J	95K	96D	97A	98V	99B	100T	101H	102U	103F	104J	105G	106L	107K	108S	109S	110C	111V	112I	
113B	114L	115F	116M	117D	118T	119K	120C	121S	122G	123C	124H	125U	126E	127I	128N	129D	130L	131K	132E	133R	134R	135S	
136S	137V	138T	139M	140H	141N	142N	143J	144V	145A	146A	147R	148F	149H	150G	151C	152O	153B	154A	155C	156G	157P	158H	
159K	160J	161E	162C	163D	164G	165U	166F	167L	168I	169M	170J	171H	172C	173O	174E	175M	176F	177D	178C	179J			

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...



A sa réunion d'octobre, le Conseil d'Administration a pu passer en revue les activités 1985 et préparer le calendrier pour 1986. Vous pourrez lire le compte-rendu de cette réunion à la suite de ces lignes. Une précision nous semble cependant nécessaire. La loi nous fait obligation de ne recevoir que nos membres et leur famille. Il nous faut respecter cette obligation. C'est pourquoi, à partir de 1986, toute personne ou toute famille s'inscrivant pour un stage devra être membre de notre coopérative; d'où l'obligation, pour ceux et celles qui ne le sont pas, d'acquérir une part de sociétaire. Cette acquisition se fait évidemment une fois pour toutes.

Tous les deux ans il est procédé au renouvellement d'une moitié des membres du Conseil d'Administration. En 1986 les conseillers sortants sont: Dominique Babin, Pierre Babin, Henri Boyet, Pierre Chevalier, Bérengère Cheverry, Jean-Paul Guillot. Il est souhaitable que de nouvelles candidatures se déclarent. Le président les recevra jusqu'au 31 janvier 1986.

***** INTER NI *****

La oktobra kunveno de la konsilantaro pritraktis la rezultojn de la ĉi-jara programo: sukceso de la julia preleg-periodo kaj de la pri-informatika staĝo; meza sukceso de la aliaj studperiodoj. La finanĉan bilancon ni konas nur komence de 1986. Ni verŝajne ne povos investi grandan sumon, despli ke ni estos devigataj pagi la "takson pri aldonita valoro". La minimuman prizorgan laboron estos la renovigo de unu el la manĝo-ĉambroj.

Niaj statutoj, kaj la leĝo, rajtigas nin akcepti nur membrojn de nia kooperativo. Ĝis nun fariĝis membroj nur tiuj, kiuj mem decidis tion fari. Ek de 1986 estos necese, ke ĉiu aliĝanto (almenaŭ unu en la familio) akiru unu akcion, se li (ŝi) ankoraŭ ne faris tion. Kompreneble per akiro de unu (aŭ pluraj!) akcio(j) oni membriĝas "por eterne".

Conseil d'Administration-

Le 20/10/85 le conseil d'administration s'est réuni à 10 h. Etaient présents: Mmes Cheverry, Lenel, Micard; MM. P. Babin, D. Babin, Bodereau, H. et F. Boyet, Dairon, Métivier. Excusés: Mme Prévot, MM. Chevalier, Guillot. Le président présente les activités de 1985. Quelques passages ont eu lieu au printemps et à l'automne: 3 séjours de 30 personnes pour deux jours

et demi, une fin de semaine pour 50 personnes, un stage d'une semaine pour 15 personnes et un buffet pour 84 participants à un rallye.

Du 15 au 30 juin 27 participants se sont réunis. Il s'agit surtout d'amis de différents pays qui se retrouvent. Un programme d'activités facultatives sera mis au point en 1986, pour mieux intégrer les nouveaux.

96 personnes ont assisté au stage du 1/21-7, dont 40 pendant les trois semaines. Les conférences de B. Cheverry, G. Lagrange, R. Lloancy, P. Métivier, B. Moon, C. Nourmont, H. Röllinger, F. Roose, G. Silfer, ont remporté un grand succès, de même que l'excursion qui a complété la conférence sur Leonardo da Vinci. Les cours se sont déroulés dans les meilleures conditions. Les soirées ont été bien suivies, en particulier le loto animé par L.N. Babin. L'administration a été assurée par C. et I. Durwaël pour la première fois.

Du 22/7 au 11/8 les cours n'ont été suivis que par 43 personnes dont une moitié seulement de Français. Mais ce séjour a été très animé. Il y a eu deux soirées de théâtre et une soirée pique-nique.

Le stage suivant se divisait en deux périodes. Du 12/8 au 24/8 l'activité informatique a eu un succès qui a obligé à louer des appareils supplémentaires et a posé des problèmes aux animateurs D. Babin et H. Boyet; les appareils étaient de types différents et les niveaux en Esperanto et en informatique des participants étaient inégaux. Du 18/8 au 1/9 un certain nombre de mal-voyants ont rejoint le stage avec leurs activités et des activités communes. Comme les années précédentes les participants ont semblé très satisfaits.

D. Babin a fait un bilan financier provisoire. Les disponibilités sont un peu plus élevées que l'an dernier en raison de l'augmentation des tarifs et au montant plus faible des investissements. La décentralisation des contrôles nous oblige à suivre la législation avec plus de rigueur. La MCE va être soumise à la TVA avec rappel possible sur 4 ans. On ne peut pas évaluer avec certitude l'incidence de cette mesure sur le compte d'exploitation. Le financement, en juin, des travaux de rénovation des évacuations des

eaux usées nous a obligés à faire un emprunt bancaire de 25 000 francs remboursable en trois ans. Une demande de subvention a été présentée au Conseil Général.

Le calendrier des stages de 1986 a été établi: 29/3-5/4 rencontre internationale d'enfants. UFE a demandé à organiser un stage de pédagogie à la même époque (29/3-2/4). Les stages d'été se répartiront ainsi: 15-29/6: rencontre internationale avec programme facultatif; 29/6-20/7: conférences, cours, excursions; 21/7-10/8: cours, excursions, activités manuelles; 10-23/8: informatique, cours; 17-31/8: stage voyants et non-voyants.

Il est nécessaire d'établir les programmes plus tôt. La réunion du Conseil d'administration d'avril s'en occupera. Il semble qu'une aide appréciable pourrait être apportée par un groupe de jeunes.

Des demandes de stages ou de passages pour le printemps sont déjà parvenues. D'autre part un projet de rénovation de la présentation des programmes est mise au point. Seront revus d'autres documents.

Les seuls travaux envisagés pour l'instant sont: réfection de la salle à manger Est, l'installation d'un régulateur de la température de l'eau et celle d'un réducteur de pression d'eau.

Six sièges de membres du CA seront à renouveler en 1986. Un appel à candidature sera lancé.

La séance est levée à 16 h.30.

Le secrétaire: G. Dairon

CCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCCC

APPEL

Les barrières entourant le jardin d'enfants et la piscine doivent être refaites. C'est là une très grosse dépense. Une participation financière, même petite, venant de nombreux amis nous aiderait. Merci.

LIBRO-SERVO - J. Vincent, BP 54, 49150 BAUGE

Jus aperis!

Tradukproponoj por la altradukaj tekstoj de la manlibro

PREPARADO al la ATESTO pri KAPABLECO (10 f.)


GRAMATIKO PER BONHUMORO

VERBIGADO DE LA VORTOJ

i - igi - iĝi - um - izi - verbigas ĉiajn vortojn

- I) **Kun substantivaj radikoj** (kongresi, fulmi) (ruinigi, pacigi) (tagiĝi, viciĝi) (foliumi, mastrumi) (najlizi, pasteŭrizi).
- II) **Kun adjektivaj radikoj** (verdi, fieri) (sekigi, pravigi) (identiĝi, nigriĝi).
- III) **Kun adverbaj radikoj kaj aliaj elementoj** (adiaŭi, apudi, ĉirkaŭi) (nei, jesi, bisi) (nepriĝi, anstataŭigi, troiĝi) (indigi, enigi, eksigi) (nepriĝi, disiĝi) (ebliĝi, ariĝi) (unuiĝi, triopiĝi) (dekumi, kvaronumi).

Ke fulmorapide ili trafu !




— S-ro farmaciisto, tablojdojn mi petas de vin.

— Kiujn tablojdojn necesas al vi ?

— Mi ne povas nei, ke kontentos min la plej duraj ; se eblas, mi preferus la ŝtalizitajn tablojdojn.

Televido ne avaras



— Papago ! ĉie tie, neniuj tiel aĉaj vortoj diras ! eble, ĉu la infanoj ?

— Ne cerbumu ! de kiam vi gastas min, mi tranoktas antaŭ la televido ; plej fortsonajn vortojn hipnotizas min !

Forflugitaj revoj



Bona feino jesos al tri el ĝiaj deziroj ; ŝi plenumis ilin, kondiĉe, ke li ne estu tro postulema.

Kio li petis ? Unue, plej bonjarajn vinojn ; due, belvizaĝajn kaj beltaliajn virinojn. Tri, super ĉio, li dezirus esti senimpostigita ; cetere, tio ĉio permesus al li ĉion.



— Ilaĵ : plenumos ; kion.

— de vi : kiuj tablojdoj ; kontentigos.

— aĉajn vortojn : gastigas ; fortsonajn vortojn.

KOREKTOJ

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (200 aŭstr. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (400 fr.).
Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (5,00 pundoj).
Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (75 kr.).
Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (50 mk).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).
Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10° - D ALICANTE - (1 100 pes.).
Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).
Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Aurorastraat, 4, 5631 KK EINDHOVEN, pĉk. 209721 (24 gld.).
Norvegujo : S-ino Louise Bøe Marmarvn 2A Oslo 11 (55 kr.).
Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).
Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (60 kr.).
Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771, LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).
Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).
Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.